

La Esperantisto.

Zeitschrift für die Freunde der Esperantosprache.

Herausgegeben unter der Mitwirkung des **Dr. Esperanto** (Dr. L. Samenhof) von **Chr. Schmidt**, Vorstand des Welt-sprachevereins in Nürnberg.

Erscheint monatlich einmal.

Zu bestellen auf der Post und in der Buchhandlung von Heerdegen-Barbeck in Nürnberg.

Preis 1 Mark für das Vierteljahr (durch die Post 1.15 Mk.).

Anzeigen werden angenommen zu 20 Pfennig für die Petitzeile.

Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto.

Sub la kunlaborado de **Dr. Esperanto** (Dr. L. Zamenhof) eldonata de **Chr. Schmidt**, prezidanto de la klubo mondlingva en Nürnberg.

Eliras unu fojon en la monato.

Oni povas aboni sur la poŝto kaj en la librejo de Heerdegen-Barbeck en Nürnberg.

Kosto 1 marko por ¼ de jaro (per la poŝto 1 marko 15 pf.).

Anoncoj estas akceptataj por 20 pfenigoj por la petitlinio.

Nr. 4.

Nürnberg, 20. Januaro 1890.

1. Jahrgang.

Esperanto kaj Volapük.

(Daurigo.)

La facileco de la Volapük estas la plej amata ĉevaleto, sur kiu ili elveturas al ĉiu okazo. „Schleyer montris al la mondo“, ili diras, „ke la homa lingvo povas esti simpligita kaj faciligita en tia grado, pri kiu la homoj, kutimintaj je ĉiuj malfacilaĵoj de la lingvoj naturaj, ne povis eĉ sonĝi. Schleyer venkis la plej ĉefan malfacilaĵon, kaj tiuj, kiuj eliris kun provoj post Schleyer, havis antaŭ si jam la plej gravan parton de la temo finitan, kaj al ili restis nur fari plibonigojn kaj perfektigojn.“ Tiel parolas la partizanoj de sinjoro Schleyer. Kelkaj el ili, konantaj nek la historion de la demando, nek ĝian naturon, efektive mem kredas, kion ili parolas aŭ, pli ĝuste, kion ili ripetas laŭ vortoj de aliaj; aliaj konscias, ke ili parolas sensecaĵon, tamen, pro la bono de la Volapük, ili tion ĉi eterne ripetadas al la publiko, estante certaj, ke la plej granda parto de la publiko prenas ĉion kun kredo, ne dezirante kaj ne povante kritike sin teni al la demando. Sed ni rigardu, en kio konsistas tiu ĉi eksterordinara simpligo kaj faciligo de la lingvo, kiu, laŭ la vortoj de la Volapükistoj, estas tia grandega merito de s-ro Schleyer. Kion respondos al ni la Volapükistoj? „Aliaj lingvoj havas multajn deklinaciojn, — Volapük havas nur unu; aliaj lingvoj havas multajn konjugaciojn — Volapük havas nur unu; en aliaj lingvoj unu vorto estas de vira sekso, alia de virina, alia de neutrala, — en Volapük ĉiuj estas de unu sekso: aliaj lingvoj havas grandan amason da diversaj, neregulaĵoj, — Volapük ilin ne havas!“ Efektive, tiu ĉi apartaĵo de Volapük, en komparo kun lingvoj naturaj, faras ĝian gramatikon senkompare pli facila ol la gramatiko de ĉiu alia lingvo. Sed ĉu estas en tio ĉi ia merito de s-ro Schleyer? Ĉu montris sin tie ĉi la frukto de lia genio, kiu ebenigis kaj faciligis la vojon al liaj „postirantoj“ (kiel la Volapükistoj nomas inter aliaj ankaŭ la aŭtoron de la lingvo Esperanto, ne komprenante ke la lingvo Esperanto estis ellaborita tute sendepende de Volapük)? Tio ĉi estas ja afero tute natura, alia la gramatiko de arta lingvo ne povis eĉ esti, kaj se ĝi estus alia, tio ĉi estus jam ne manko de genio, sed simple frenezo. Ĉu al homo, kiu fosas kanalon inter du lokoj, oni povas kalkuli kiel merito, ke li faras tiun ĉi kanalon rekta kaj ne elfleksita kaj neregula kiel ĉiuj riveroj naturaj? Fari tiun ĉi kanalon rekta estas ja afero multe pli natura kaj facila, ol fari ĝin fleksita kaj neregula, kaj se tiu homo farus la kanalon artan elfleksita kiel la riveroj naturaj, tio

ĉi estus jam ne manko de genio, sed simpla frenezo. La lingvoj naturaj, kiuj ellaboriĝis blinde kaj laŭ la volo de okazo, havas multajn neregulaĵojn; sed se homo, kiu kreas lingvon arte, volus enkonduki en ĝin diversajn neregulaĵojn, tiam ni ne dirus, ke li estas ne sufiĉe genia, sed rigardus lin simple kiel freneza. Ĉar al kiu venos en la kapon enkonduki kelkajn deklinaciojn, se li povas kontentiĝi je unu? Kiu volos arte kaj intence krei neregulaĵojn? La kreado de lingvo regula, kun unu deklinacio, kun unu konjugacio k. c. ne sole ne estas pli malfacila ol la kreado de neregula kaj ne postulas apartajn artifikojn, sed kontraŭe, la kreado de lingvo neregula estus afero senkompare pli malfacila, ĉar la aŭtoro ne sole sin turmentus vane super la kreado de dua kaj tria deklinacio, sed li absolute ne sciuis kie alpendi tiun ĉi superfluan balaston; tial se homo kreinte artan lingvon, donis al ĝi nur unu solan deklinacion k. c., tio ĉi estas afero tute natura kaj neniel povas esti alkalkulata kiel merito. Kiu ajn el Vi, sinjoroj legantoj, se Vi volus krei artan lingvon, ĉu Vi farus alie? Ĉu Vi kreus intence iajn neregulaĵojn, kaj eĉ povus al Vi veni en la kapon io simila?

Sed eble tiu ĉi simpleco de la gramatiko, kiun tiel laŭdas la Volapükistoj, estas io simila al la ovo de Kolombo? Eble ĝi saĝnas al ni tiel ordinara afero nur nun, kiam oni ĝin jam montris al ni? Sed en tia okazo rigardu ĉiujn tiujn provojn pazigrafiajn aŭ pazilaliajn, kiuj estis faritaj antaŭ Volapük — ĉu Vi trovos eĉ en unu el ili kelkajn deklinaciojn, kelkajn konjugaciojn aŭ iajn neregulaĵojn? Se la simpleco de la gramatiko postulas iajn apartajn geniajn artifikojn, tiam la aŭtoroj de ĉiuj diritaj provoj estis geniaj artifikistoj, ĉiuj ili mirigis nin per unu sama ovo de Kolombo, kaj tiu ĉi merito sekve denove ne apartenas al s-ro Schleyer.

Sinjoro Schleyer pardonu al mi, se mi detruis lian ĉefan aŭreolon, se mi faris nulon el tio, kion liaj amikoj nomas lia plej ĉefa merito. Mi faris tion ĉi ne ĉar mi envidus liajn laŭrojn aŭ volus malgrandigi lian indon; kontraŭe, mi alte estimas s-ron Schleyer kaj donas plenan konfeson al liaj grandegaj laboroj kaj al lia nobla deziro alporti utilon al la homaro. Mi pli ol iu alia scias, kian grandegan laboron kaj feran paciencan postulas la kreado de kiu ajn arta lingvo, kaj se en laboro de s-ro Schleyer mi vidas malfeliĉan provon, konstruitan sur erara fundamento kaj ne havantan estontecon, mi en ĉiu okazo la laboron kaj la bonon deziron de s-ro Schleyer tenas tre alte. Sed mi ne povas vidi meriton tie, kie absolute nenia ekzistas. Cetere mi silentus pri tio ĉi, se

ne la zirkonstanco, ke tiun ĉi malveran meriton de s-ro Schleyer kelkaj obstinaj liaj partizanoj uzas por batali kontraŭ la lingvo Esperanto. „La plej gravan“, ili diras, — „la facilecon de la gramatiko la lingvo Esperanto prenis de Volapük; la plej malfacila parto de la temo sekve jam estis solvita de Schleyer, kaj se ni forlasos Volapük'on, tio ĉi estos sendankeco de nia flanko kaj ni estos renegatoj“. La amikoj de Volapük devas konsenti, ke ekster la facileco de la gramatiko la lingvoj Esperanto kaj Volapük havas inter si nenion komunan; kaj ĉar mi jam montris, ke tuŝante tiun ĉi facilecon de la gramatiko la lingvo Esperanto ne sole eltiris, sed ankaŭ ne povis eltiri ian utilon el la laboroj de s-ro Schleyer, ĉar tiu ĉi facileco (en tiu grado, en kiu ĝi sin trovas en Volapük) estas afero tute natura kaj ne povas esti ies merito, — tiel la sinjoroj Volapükistoj konsentos, ke la lingvo Esperanto en ĉiu okazo havas meritojn tute ne malpli ol Volapük, — pri sendankeco sekve tie ĉi ne povas esti eĉ parolo. Kaj kio tuŝas la renegatecon, je kiu kelkaj Volapükistoj riproĉas tiujn el iliaj estintaj kolegoj, kiuj transiris al Esperanto, tiu ĉi riproĉo estas entute pure infana kaj montras ne sufiĉe seriozan teniĝon al la afero: ni batalas ne por la aŭtoro de Volapük kaj ne por la aŭtoro de la lingvo Esperanto, sed por la ideo de lingvo tutmonda. Ni devas oferi la personon pro la ideo kaj ne la ideon pro la persono. Se ni konscias, ke ni estas sur malvera — vojo, ni devas deiri de ĝi, por transiri sur la veran. Tiuj Volapükistoj, kiuj kredas, ke Volapük estas vojo vera, devas resti al ĝi fidelaj; tiuj, kiuj ne scias kion elekti, povas labori egale por Volapük kaj Esperanto (ĉar pli bone estos se ni havos du lingvojn tutmondajn, ol se ni havos neniun); sed tiuj, kiuj defendas Volapük'on kaj batalas kontraŭ Esperanto nur tial ke ili timas esti nomataj renegatoj, montras per tio ĉi, ke ili ne havas ideon pri la afero kaj memorigas tiujn obstinulojn de la bona malnova tempo, kiuj el estimo al la tradicio batalis kontraŭ la ĉi konduko de vaporo, aŭ tiajn strangulojn, kiuj volus batali kontraŭ la telefono, timante fariĝi sendankaj al la memoro de la elpensintoj de la telegrafo.

Mi petas pardonon pro la deflankiĝo, kiun mi faris, kaj mi denove transiras al la analizado de la facileco de l' Volapük. Mi montris, ke la faciligo de la gramatiko en tiu mezuro, en kiu ĝi sin trovas en Volapük, estas nenian merito, ĉar ĝi estas afero tute natura kaj postulis nenian fort'uzon de la kapo. Komparinte la gramatikon de Volapük kun la gramatiko de Esperanto, la legantoj facile venos al la konvinko, ke la dua estas multe pli simpla kaj facila; se sekve efektive la ĉefan rolon en la lingvo havus la facileco de ĝia gramatiko, la lingvo Esperanto devus jam esti starigita pli alte ol Volapük. Sed la facileco de la gramatiko en lingvo arta estas afero tre sensignifa, kaj se ĝi en unu sistemo iris iom pli malproksime ol en la alia, tie donis al la lernanto la eblon ŝpari ankoraŭ unu kvaronon aŭ duonon da horo, tio en tia grava afero kiel lingvo tutmonda havas absolute nenian signifon. Por ni grava estas la demando, ĉu la lingvo mem en sia tuteco estas facila? Por vidi kiom Volapük kontentigas tiun ĉi demandon, ni devas memori la jenon: ĉiu lingvo konsistas el gramatiko kaj vortaro; la tempo kiun oni devas uzi (aparte en lingvo arta) por la ellernado de la gramatiko, estas absoluta nulo en komparo kun la tempo kiun oni devas uzi por la ellernado de la vortaro. La facileco de la lingvo dependas sekve la plej multe de la facileco de ĝia vortaro. Nun diru al mi, sinjoroj varmegaj Volapükistoj, ĉu la vortaro de Volapük estas facila? Metu la manon sur la koron kaj respondu al mi, kiom da tempo Vi uzis por la ellernado de la vortaro de Volapük, kaj tamen ĉu Vi povas nun diri, ke Vi scias ĝin parkere kaj ke Vi nun, post multaj laboroj, povas kompreni sen vortaro ĉion kio estos skribita en Volapük?

La lingvo de ĉiuj civilizitaj popoloj havas nun multon komunan inter si. Tial, ellernante kiun ajn lingvon, Vi renkontas multegon da vortoj, kiujn ekmemori estos por Vi tre facile. En la Volapük tamen ĉiuj vortoj estas al Vi tute fremdaj, kaj eĉ la nomojn proprajn de personoj aŭ urboj Vi devas ellerni kiel vortojn nove-kreitaĵoj! Al la nesperta publiko Vi montras la facilecon de la gramatiko de Volapük kaj kredigas, ke tiun ĉi facilecon ni devas danki la genion de s-ro Schleyer, kaj la publiko ofte entuziasmiĝas, ne rimarkante, ke tio nemulta kio estas gajnata per la natureco de la gramatiko, estas cent kaj mil fojojn perdata per la sennatureco de la vortaro, kaj ke danke la vortaro (kiu, kiel mi jam diris, estas la plej grava parto de l'lingvo) Volapük estas ne sole ne pli facila ol la lingvoj naturaj, sed ankoraŭ multe pli malfacila ol ili! Kaj tamen de lingvo, kreita pripensite en kabineto kaj ne blinde de multaj generacioj, ni ja povis atendi, ke ĝi estos senkompare pli facila ol la lingvoj naturaj! Tiu stranga fakto, ke lingvo arta elvenis pli malfacila ol naturaj, kaj ke al s-ro Schleyer venis en la kapo disformigi kaj nove krei ne sole vortojn ĉiukonatajn, sed eĉ la nomojn proprajn, estas al multaj tute ne komprenebla. Efektive ĝi estas nur konsekvenco kaj rekta sekvo de la malfeliĉa gramatiko de Volapük, kiu devigis s-ron Schleyer konsekvence kaj senkompare disformigi ĉion, eĉ nomojn proprajn, ke ili nur ne venu en konflikton kun lia gramatiko. Unu ŝtono, ne bone metita en la fundamento, sekvigas jam post si ĉiam pli grandigantan malrektecon de la tuta konstruo. Sed mi ne volas tie ĉi analizi vaste la kaŭzojn, mi volis nur montri la fakton, ke Volapük ne sole ne estas pli facila ol la lingvoj naturaj, sed estas ankoraŭ pli malfacila ol ili, kaj ke tiuj, kiuj montras al la publiko la gramatikon de Volapük kaj sur tiu ĉi fondo parolas pri la facileco de la lingvo, silentante pri la vortaro, — aŭ sin mem trompas, aŭ trompas la publikon. Dume la facileco estas ja unu el la unuaj kondiĉoj, kiuj estas postulataj por ke arta lingvo povu esperi neforflugantan sukceson. Homoj, kiuj entuziasmiĝas sub la impreso de reklamoj, komencas laboron ne demandante sin al kio ĝi kondukos; sed la tempo de entuziasmo jam forpasis, kaj la reklamoj, en kiuj la Volapükistoj sin montris tiel lertaj, jam ne altiras, kaj nun, antaŭ ol komenci la lernadon de Volapük kaj oferi por tio ĉi tutajn monatojn kaj jarojn, la homoj sin demandas: „kie mi havas la garantion, ke mia granda laboro ne estos perdita?“ kaj tial la nombro de la homoj, kiuj komencas la lernadon de Volapük, estas jam nun tre malgranda; kaj post kelkaj jaroj eĉ tiuj, kiuj ĝin ellernis, ĵetos ĝin, ĉar ili venos al la konvinko, ke laboron ili perdis multe kaj utilon Volapük alportas al ili nenian, ĉar neniu en la mondo ilin komprenas. Sed kun la lingvo Esperanto la afero estas tute alia —: danke la vortaron, kiu preskaŭ tuta estas konata al ĉiu iom civilizita homo (kaj en la unua tempo por ni ja estas gravaj nur tiaj homoj, ĉar la sovaĝaj Afrikanoj ja ne bezonas ankoraŭ lingvon tutmondan), — danke tiun ĉi vortaron la lingvo estas tiel facila, ke se Vi oferis nur kvaronhoron por ekkoni la gramatikon de la lingvo, Vi povas jam komenci la legadon de libroj kaj gazetoj en tiu ĉi lingvo, kaj se Vi volos ankoraŭ facile tralegi (kaj ne labore lernegi) ian libron kun ekzercoj en tiu ĉi lingvo, — Vi jam tute bone scios la lingvon, perdinte por tio ĉi nenian laboron! Danke tian konstruon, la nombro de la amikoj de la lingvo Esperanto konstante pligrandigados, ĉar ĉiu diros al si: „se la sorto eĉ ne volos ke tiu ĉi lingvo fariĝu tutmonda, en ĉia okazo lernante ĝin mi nenion perdas, ĉar la lernado postulas de mi nenian laboron, kaj gajnon mi havas jam tiun, ke mi ricevas la eblon kompreniĝi kun la tuta civilizita mondo, kaj al tio ĉi mi, preskaŭ nenion oferante, helpas la efektivigon de granda afero. Vi vidas, sinjoroj

Volapükistoj, kiel ĉe pli proksima analizado staras la afero kun la laŭdata facileco de via Volapük, kaj kia granda diferenco en tiu ĉi rilato estas inter Volapük kaj Esperanto. Dum la ŝajna facileco de Volapük povis nur pase entuziasmigi la homojn sub la influo de laŭtaj reklamoj, la vera facileco de Esperanto garantias al ĝi, ke ĝi trankvile, paŝo post paŝo trabatos al si la vojon tra la tuta mondo.

(Daŭrigo venos.)

Nokt' en la koro.

(el Byron.)

Nokt' en koro . . . la harpo kuŝas . . .

Vi tuj ekkantu kantisto!

Se vi la kordojn' de l'harpo tuŝas,

Vi miron faras, artisto.

Se kor' ankoraŭ havas esperon,

Per kantoj ĝi ekvekiĝos;

Se la okulo kaŝis larmeron,

Denove ĝi eklarmiĝos.

Kant' via tondru mondan doloron!

La gajon mi ne komprenos . . .

Vi min plorigu, movu la koron.

Aŭ mia brust' ne eltenos.

Ĝi de suferoj longe manĝeĝis,

Silentan premis la ĉeno! . . .

La tempo venis . . . ĝi jam pleniĝis,

Kiel vazet' de veneno.

L. B—al.

La renkonto de ŝipoj.

(el angle.)

Kiam ni longe sur maroj vojiras,
Tagoj kaj noktoj eterne sin tiras;
Ho, kia ĝojo, komprenas ŝipano,
Ŝipon renkonti sur la oceano!

Ĉiu okulo radias,

„Ŝipo hoj!“ ĝoje ni krias;

Dume revenas respondoj:

„Ŝipo hoj!“ sonas sur l'ondoj,

Kaj ni rapidas alveni proksime,
Pri niaj karaj paroli intime, —
Sed tuj alvenas l'adiau turmenta,
Por revojiri sur maro silenta.

A. Grabowki.

Guto de pluvo.

Guto de pluvo enfalis foje

En grandan profundan maron.

„Ho!“ ĝi forte ekkriis malĝoje,

Vidante la grandan akvaron,

„Tien ĉi venu granda rivero, —

Sed kion signifos unu akvero?“

Sed jen rigardu, — konko alvenis,

Per unu gluton la guton enprenis,

Kaj baldaŭ nia gut' aliĝis

Kaj kosta perlo el ĝi fariĝis.

Jes amikoj, la guton memoru,

Laŭ Viaj fortoj ĉiu laboru:

Ofte la plej modesta guto

Fariĝas perlo per unu gluto.

M. Goldberg.

Novajĵoj.

Sinjoro Jayme H. Ferreira el Lisabon tradukis la vortareton de nia lingvo en la lingvon portugalan; kredeble ĝi baldaŭ estos eldonita prese.

En la lasta tempo nia afero komencis vastiĝi ankaŭ en Turkujo. La ĉefa laboranto tie estas sinjoro Victor Livingstone Levy en Koustantinopolo, redaktoro de la gazeto „El Telegrafo“.

Sinjoro R. Libeck el Riga skribas al ni, ke nia afero inter la Latvoj (Letten) iras sufiĉe bone.

Granda parto de niaj amikoj uzas nun sur ĉiuj siaj leteroj kaj kovertoj stampon en Esperanto; ni trovas tion ĉi tre bona, ĉar ĝi kondukas al la vastigado de nia afero.

✍ Sinjoro Vl. de Majnov en S. Petroburgo skribis al ni: „Mia amiko! Mi ricevis de plej glora Rusa poeto kaj filozofisto, la s-ro grafo Lev Nikolaevič de Tolstoj en Jasenki, gub. Tulstoj, leteron, en kiu li scribis, ke li ellernis kaj propagandados per ĉiaj fortoj nian karan lingvon.“ — — —

La redakcio.

Respondoj al la amikoj.

La plej koran gratulon je la venanta nova jaro kaj la plej bonajn dezirojn al ĉiuj amikoj de nia afero. Mi petas pardoni al mi ke mi ne povis sendi kartojn apartajn.

L.-Z-f.

Al s-rino Ch. en Bialystok. Vian rublon mi sendis al la redaktoro, kaj Vi estos enskribita ĝis 1/IV 90. Mi miras, ke nia afero tiel dormas en Via urbo.

L.-Z-f.

Al miaj korespondantoj. Mia nova adreso nun estas: D-ro L. Zamenhof en Cherson (Rusujo). Se iu skribos laŭ mia adreso malnova (Varsovio), mi la deteron ankaŭ ricevos, sed kelkajn tagojn pli malfrue.

L.-Z-f.

Al s-ro M. en S. Petersburg. Via energia laborado estas tre laŭdinda; sed Via faremeco estus multe pli utila por nia afero, se Vi uzus ĝin en alia maniero. Anskataŭ la personoj, kiujn Vi gajnis por nia afero kaj kiuj nenion faras, estus pli utile se Vi povus gajni unu aŭ kelkajn riĉulojn, kiuj volus ion fari por nia afero. La plej bedaŭrinda fakto en nia afero estas tiu, ke ni ne havas ankoraŭ inter niaj amikoj eĉ unu riĉulon, kiu povus kaj volus ĝin subteni. En nia tempo sen rimedoj materialaj ĉia afero povas progresi nur tre malrapide, kaj ĉiu paŝo kostas doloron kaj suferon.

L. Z-f.

Al s-ro H. en Odessa. Via letero estas skribita tute senarare; nur la akuzativon Vi uzas ofte en okazoj kie oni tute ĝin ne bezonas. Tuŝante la akuzativon mi povas al Vi doni la jenan konsilon: uzu ĝin ĉiam nur en tiuj okazoj, kie Vi vidas ke ĝi estas efektive necesa; en ĉiuj aliaj okazoj, kie Vi ne scias, ĉu oni devas uzi la akuzativon aŭ la nominativon — uzu ĉiam la nominativon. La akuzativo estas enkondukita nur el neceso, ĉar sen ĝi la senco ofte estus ne klara; sed la uzado ĝin en okazo de senbezono pli multe malbeligas la lingvon ol la neuzado en okazo de bezono.

L.-Z-f.

Al s-ro W. en S. P. En la stilo de Via artikolo mi faris kelkajn ŝanĝojn. La formoj „tiela (anstataŭ „tia“), „naciono“ (anstataŭ „nacio“) per si mem estas ne malbonaj, kaj eble kun la tempo la verkantoj ilin akceptos kaj ili elpuŝos iom post iom la formojn malnovajn; sed en ĉiuj artikoloj aŭ verkoj, kiuj eliras sub mia redakcio, mi devas peni, ke la lingvo estu unuforma; ĉar alie la legantoj povos ĝin akcepti kiel faktajn kaj devigajn novenkondukajojn.

L. Z-f.

Al s-ro Dro. Dan. Mazignoni en Crema. Mi sendis 1000 ekzemplerojn de nia gazeto al Italujo kaj mi esperas tial, ke ankaŭ en Via patrolando la praktikeco, utileco kaj beleco de la lingvo internacia komencos baldaŭ venki. Kun saluto internacia.

Al s-ro de Majnov Petroburgo. Mi dankas por Viaj bonaj sciigoj. La germanaj Volapükistoj estas tiel blindigitaj, ke ili ne povas trovi la grandan diferencan inter la lingvo „Esperanto“ kaj „Volapük“. Kun kora saluto.

Al s-ro José Rodriguez en Malaga. Ĉu Vi ricevis germanan gramatikon kaj la gazetojn? Saluton.

Al s-ro A. L. Bancroft en San Francisko. Kun granda plezuro mi legis Vian volapük-an leteron. Ĉia saĝa homo pensas tiel kiel Vi kaj diras, ke la lingvo Esperanta estas pli bela kaj pli praktika ol Volapük. Skribu al mi baldaŭ en lingvo Esperanta. Kun kora saluto.

Al s-ro H. Ph. en Philadelphia. Sendu al mi Vian historion de la demando pri lingvo tutmonda. Dirante antaŭe al Vi mian bonkoran dankon mi restas kun altega estimo Via plej humila. Chr. Sch.

Al s-ro C. Hübert en A. La presistoj de nia gazeto estis malsana je „Influenco“, tial la tria numero ne pli frue povis esti preta. Koran dankon por Viaj penadoj. Saluton internacian.

Al s-ro R. Ailrin en Zürich. Viaj deziroj estas plenumblaj. Pro Via oferto mi sciigas Vin, ke s-ro J. Ferreira, rua de S. Juliao, 67, el Lisbon preparas por la presado gramatikon de la lingvo Esperanta por Portugaloj.

Al s-ro A. Grabowski. Mi bedaŭras, ke mi ne povas esti akurata en la korespondado. Multaj laboroj estas la kaŭzo de mia malrapideco. Tial mi esperas, ke miaj amikoj pardonos min. Kun saluto internacia.

Al s-ro pastro A. F. Runstedt en Wedum. Mi penas bonkore Vin labori por nia grava afero, ke ĝi starigu baldaŭ sur fortaj piedoj ankaŭ en Via estimata patrolando. Ankaŭe mi diras al Vi mian koregan dankon por Via penadoj. Koran saluton.

Al s-ro E. v. Wahl en Petroburgo. Kun granda bedaŭro mi legis Vian sciigon pri la frua morto de via amata amiko sinjoro A. Scheffler. Viaj proponoj venos en la kvina numero de nia gazeto. Kun kora saluto.

Al s-ro Viktor Björkman en Gefle. Havu la bonecon kaj skribu al sekvantaj sinjoroj: 1. J. Ferreira en Lisbon (rua de S. Juliao 67), 2. A. L. Bancroft en San Francisko (Post-Street 132), 3. E. de Wahl, studento de matematiko, en S. Petroburgo (Université, collège de l'Empereur Alex. IV.), 4. F. Schneeberger, Wien (Ober-Döbling 10), 5. Geoghegan, R., en Birkenhaed (14 Prince's Terr. Anglujo). Kun kora saluto.

Al s-ro J. H. Tegner en Venersborg. Mi esperas, ke Via laborado estos fruktoporta en Via patrolando. Kun saluto internacia.

Al s-ro Vogl en Osterhofen. Mi esperas, ke Vi skribos baldaŭ al mi en lingvo Esperanta. Kun kolega saluto. La redakcio.

Mia amiko!

Kun grandega malgajo mi sciis el nia gazeto, ke oni volas estigi tutmondan ligon de Esperantistoj, por ke faradi ŝanĝojn en la lingvo. Unue mi opinias, ke havi apartan ligon, aŭ akademion, oni ne devas, ĉar ni vidis, kian malutilon metis tia ĉi leĝdonanta kasto al la volapük, kaj due mi pensas, ke la ŝanĝoj bonaj povas eniri en la lingvon kaj sen la akademio per manoj de literaturistoj.

Ĉiaj Esperantistoj povas donadi egalrajte siajn voĉojn en nia sankta afero, tio estas eldoni librojn enhavantajn iliajn proponojn kaj ĉe ĉiaj aliaj adeptoj estados la rajto preni aŭ ne preni ilin.

Se la egaleco de ĉiuj foriros el nia lingvo, tia ĉi lingvo perdos la grandegan forton. Nia instruita amiko sinjoro Henry Phillips skribis al mi, ke li volas fari neniajn ŝanĝojn en la lingvo; tion ĉi opinias ankaŭe ĉiaj veraj amikoj de la afero kaj ne volantaj reĝadi.

Mi ne estas malamiko de progresado, sed la progresado deva esti gadi ne per volo de akademiistoj, sed per volo de ĉiuj, esprimadanta en la literaturo, kia estas vera voĉo de la tuta societo. Faru ĉion, kio estas ebla, por ke ne meti morton je la lingvon kaj por ke savi la plejsanktan aferon.

Via amiko

Vladimir Vladimirovič
de Majnov.

P.S. Tial ĉi leteron mi sendis ankaŭ al sinjoro Ludvigo Zamenhof.

Anoncoj.

Funebra sciigo.

Kun profunda doloro ni sciigas la amikojn internaciajn, ke je l' 12./24. Decembro 1889 mortis nia amata kolego

S-ro Andreas Scheffler,

stud. de matematiko,

la unua kaj plej varma amiko de nia afero en nia urbo.

La Petroburgaj Esperantistoj.

G. Zechmeyer en Nürnberg.

Plej granda komerco de la poŝtsignoj.

Ĉiuj kasitaj poŝtsignoj estas aĉetataj kaj ŝanĝataj.

Alle gebrauchten Briefmarken werden gekauft und umgetauscht.

La presejo de W. Tümmel en Nürnberg,

de kiu tiu ĉi gazeto estas presata, rekomandas sin por ĉiuj presa laboroj.

*Senpage instruas la lingvon Esperantan
Vladimir Vladimirovic de Majnov en S. Peterburg.*

Rekomendo.

Ni rekomendas al ĉiuj amikoj de la muziko la melodiajn kompoziciojn de la sinjoro Fr. Gutmann, bona amiko de nia afero, aparte sian novan pecon: „Der Fischerknabe“ (La fiŝisto-knabo), eldonita 1. por kantado kun fortopiano (kosto 1 marko), 2. por orkestro (kosto 3 markoj), 3. per citro kun kantado (kosto 1 marko), 4. por fortopiano kiel marŝo (kosto 80 pf.), 5. por unu citro (kosto 80 pf.), 6. por du citroj (kosto 1,30 M.). Oni povas ricevi tiujn ĉi verkojn rekte de la komponisto (Frd. Gutmann en Nürnberg, Ludwigstrasse 14). Anstataŭ mono oni povas sendi signojn de poŝto de ĉia lando.

gn. Ein

Pronomina personalia.

a)	1. Person	mi = ich,	ni = wir
Singular.	2. "	vi = du,	vi = ihr
	3. "	li = er, ŝi = sie, ĝi = es;	ili = sie
	Reflexiv: si = sich; indefinit: oni = man.		

b) Deklination:	Nom.	mi = ich,
	Gen.	de mi = meiner,
	Dat.	al mi = mir,
	Acc.	min = mich. 1)

Adjektiv.

Deklination.

	Singul.
Nom.	la bona patro = der gute Vater,
Genit.	de la bona patro = des guten Vaters,
Dat.	al la bona patro = dem guten Vater,
Acc.	la bonan patron = den guten Vater,

	Plural.
Nom.	la bonaj patroj = die guten Väter,
Genit.	de la bonaj patroj = der guten Väter,
Dat.	al la bonaj patroj = den guten Vätern,
Acc.	la bonajn patrojn = die guten Väter.

Pronomina possessiva.

Sing.	1. Pers.	mia = mein,
	2. "	via = dein,
	3. "	lia = sein, ŝia = ihr, ĝia = sein sia = sein (reflexiv).

Plural.	nia = unser,
	via = euer,
	ilia = sie.

Numerale.

a) Grundzahlwörter.

unu = 1	ses = 6	dekunu = 11	tridek = 30
du = 2	sep = 7	dekdu = 12	u. s. f.
tri = 3	ok = 8	dektri = 13	cent = 100
kvar = 4	nau = 9	u. s. f.	centunu = 101
kvin = 5	dek = 10	dudek = 20	ducent = 200
mil = 1000, miliono = die Million.			

- b) Ordnungszahlwörter werden gebildet aus den Grundzahlwörtern mittels der Adjektivendung **a**; z. B. unua = erste, dua = zweite, kvina = fünfte u. s. w.
- c) Bruchzahlwörter endigen auf **on**; z. B. duono = ein halbes, kvarono = ein viertel etc.
- d) Vervielfältigungszahlwörter endigen auf **obl**; z. B. duobla = zweifach, triobla = dreifach etc.
- e) Sammelzahlwörter endigen auf **op**; z. B. duope = zu zweien, kvarope = zu vieren etc.
- f) distributive Zahlwörter durch Vorsetzung von **po** gebildet, z. B. po kvin = je fünf etc.

Verbum.

Konjugation.

1) Indikativ.

I. Aktiv	Singular	Plural		
Gegenw.	mi amas	ich liebe	ni amas	wir lieben
	vi	du liebst	vi	ihr liebt
	li	er	ili	sie lieben
	ŝi	sie		liebt
	ĝi	es		
Vergangenh.	mi amis	ich liebte	ni	wir liebten
		ich habe geliebt	amis	wir haben geliebt
		ich hatte geliebt		wir hatten "
		u. s. w.		u. s. w.

Zukunft	mi amos	ich werde lieben
		ich werde geliebt haben
		u. s. w.
	ni amos	wir werden lieben
		wir werden geliebt haben
		u. s. w.

2) Konjunktiv und Konditionalis.

mi vidus	ich sehe
	ich würde sehen
	u. s. w.

3) Imperativ und Optativ.

amu!	liebe!
	liebet!
mi amu!	lasst mich lieben!
ni amu!	lasst uns lieben!

1) In gleicher Weise werden auch die übrigen Fürwörter dekliniert.
* Anmerkung. Gi soll nur für Tiere und Sachen stehen.

4) Particip.

Aktiv.	praes. endigt auf ant (amant = lieben)
	perf. " " int (amint = der geliebt hat)
	fut. " " ont (amont = der lieben wird)
Passiv.	praes. endigt auf at (amat = der geliebt wird)
	perf. " " it (amit = gel., der gel. word. ist)
	fut. " " ot (amot = der gel. werden wird, der zu liebende).

II. Passiv.

1) Indikativ.

Singular.

Gegenw.	mi estas amata = ich werde geliebt,
	vi " " = du wirst geliebt,
	li " " = er
	ŝi " " = sie
	ĝi " " = es
	wird geliebt.

Plural.

ni estas amataj = wir werden geliebt,
vi " " = ihr werdet geliebt,
ili " " = sie werden geliebt.

Singular.

Vergangenh.	ich wurde geliebt,
mi estis amata	ich bin geliebt worden,
	ich war geliebt worden
	u. s. w.
	Plural.
ni estis amataj	wir wurden geliebt,
	wir sind geliebt worden,
	wir waren geliebt worden
	u. s. w.
	Singular.

Zukunft.	mi estos amata	ich werde geliebt werden,
		ich werde geliebt worden sein.
		Plural.

ni estos amataj	wir werden geliebt werden,
	wir werden geliebt worden sein.

2) Konjunktiv und Konditionalis.

mi estus amata = ich würde geliebt werden
u. s. w.

3) Imperativ und Optativ.

estu amata! Sei oder werde geliebt!
estu amataj! Seid oder werdet geliebt!

Präposition.*)

anstaŭ = anstatt,	super = über, oberhalb,
dum = während,	trans = jenseits,
laŭ = nach, gemäss,	intern = innerhalb,
ekster = ausser, ausserhalb,	de = von,
malgraŭ = ungeachtet,	kun = mit,
per = mittelst, durch,	el = aus,
al = zu,	sur = auf,
apud = bei (Ort),	en = in,
ĉe = bei (Pers.),	pri = von, über,
pro = um, willen, wegen,	sub = unter,
post = nach,	inter = zwischen,
sen = ohne,	ĉirkaŭ = um, herum, gegen,
kontraŭ = gegen,	tra = durch,
antaŭ = vor,	por = für.

Ist aus dem Sinn des Satzes nicht ersichtlich, welche Präposition anzuwenden ist, so setzt man das neutrale „je“.

Konjunktion.

kaj = und,	ja = doch,
ankaŭ = auch,	ĉar = denn, weil, da,
ankoraŭ = noch,	ol = als,
tamen = doch, jedoch,	nek — nek = weder, noch,
eĉ = sogar,	jen — jen = bald — bald,
nur = nur,	ĉu = ob,
sed = aber, sondern,	ke = dass, damit,
au = oder,	kvankam = obgleich,
ĝis = bis,	se = wenn,
ajna = auch nur,	ju — des = je — desto.

Interjektion.

ha! = A! Ach!	jen! = da! siehe!
ho! = O! Ach!	fi! = pfui!
	hura! = Hurrah!

Anmerkung. Je nachdem die Participien substant., adjekt. oder adv. Bedeutung haben, erhalten dieselben die entsprechenden grammatikalischen Endungen; z. B. l'amanto = der Liebende, l'amanta patro = der liebende Vater, amante = liebend (indem ich liebe), aminte = nachdem ich geliebt hatte, amonte = wann ich geliebt haben werde.

*) Alle Präpositionen regieren den Nominativ.

V. Korrelation

der Fürwörter mit den Umstandswörtern und unbestimmten Zahlwörtern.

Wortart	Affirmation	Negation	Indefinit.	Demonstrativ	Interrogativ u. relativ
Substant. (für Sachen)	io etwas	nenio nichts	ĉio alles	tio das	kio was
Adjekt.	ia irgend einer	nenia kein	ĉia jeder	tia solcher	kia was für ein
Adverb. l.	ie irgendwo	nenie nirgends	ĉie überall	tie ¹⁾ dort	kie wo
Adverb. m.	iel irgendwie	neniel keineswegs		tiel so	kiel wie
Adverb. k.	ial irgend warum			tial darum	kial warum
Adverb. t.	iam irgend wann	neniam niemals	ĉiam immer	tiam ²⁾ dann	kiam wann
Adv. quant.	iom ein wenig			tiom soviel	kiom wie viel
Pronom. person. indef.	iu jemand	neniu niemand	ĉiu jedermann	tiu ³⁾ jener, derjenige	kiu wer, welcher

¹⁾ tie dort, tie ĉi hier

²⁾ tiam dann, tiam ĉi jetzt

³⁾ tiu jener, tiu ĉi dieser.

Anmerkung. Auch diese Wörter werden, soweit sie flexionsfähig sind, wie das Hauptwort dekliniert.

VI. Wortbildung.

Zur Bildung neuer Wörter mit neuen Begriffen dienen folgende Präfixe und Suffixe:

- „ge“ (Präfix) fasst beide Geschlechter in einem Begriff zusammen; z. B. frato = Bruder, gefratoj = Geschwister;
- „id“ = Nachkomme; Beispiel Napoleono = Napoleonidoj = Nachkommen des Napoleon;
- „bo“ bezeichnet die durch Heirat entstehenden Verwandtschaftsarten: z. B. filo = Sohn, bofilo = Schwiegersohn;
- „uj“ = Behälter, Träger; dient auch zur Bezeichnung der die betreffenden Früchte tragenden Bäume und der von den betreffenden Völkern bewohnten Ländern; z. B. plumo = Feder, plumujo = Federbüchse; pomo = Apfel, pomujo = Apfelbaum, = Germano = der Deutsche, Germanujo = Deutschland;
- „ing“ dient zur Bildung derjenigen Wörter, welche Gegenstände bezeichnen, in die das im Stammwort ausgedrückte eingesetzt wird; z. B. plumo = Feder, plumingo = Federhalter;
- „an“ = Mitglied, Anhänger, Einwohner; dient zur Bildung derjenigen Wörter, welchen diese Allgemeinbegriffe zu grunde liegen; z. B. klubo = Verein, klubano = Vereinsmitglied; republiko = Republik, republikano = Anhänger der Republik; urbo = Stadt, urbano = Städter;
- „estr“ = Vorstand, Vorsteher, Vorsitzender, z. B. klubo = Verein, klubestro = Vereinsvorstand;
- „er“ bezeichnet von den das Ganze zusammensetzenden gleichartigen Dingen das einzelne; z. B. mono = Geld, monero = Münze.
- „ar“ dient zur Bezeichnung von Sammelbegriffen; z. B. arbo = Baum, arbaro = Wald, monto = Berg, montaro = Gebirg.
- „ul“ erhebt die betreffende Eigenschaft zum Personenbegriff; z. B. saĝa = weise, saĝulo = der Weise.
- „ind“ = würdig, wert; z. B. kredi = glauben, kredinda = glaubwürdig; vidi = sehen, vidinda = sehenswert;
- „ebl“ = möglich, fähig; z. B. manĝi = essen, manĝebla = essbar; vidi = sehen, videbla = sichtbar; kredi = glauben, kredebla = glaubhaft;
- „aj“ dient zur Bildung von Substant. aus adjekt. und adverb. Begriffen, sowie aus Substantiven, welche einen Stoff bezeichnen; z. B. vera = wahr, veraĵo = das Wahre; ĉirkaŭ = um, herum, ĉirkaŭaĵo = die Umgebung; fero = Eisen, feraĵo = Eisenzeug;
- „ec“ bildet aus dem Adjektiv den entsprechenden abstrakten Begriff; z. B. vera = wahr, vereco = Wahrheit; libera = frei, libereco = Freiheit;
- „em“ = Neigung, Gewohnheit; z. B. scii = wissen, sciema = wissbegierig; pura = rein, puremeco = Reinlichkeit;

- „et“ bezeichnet eine Verkleinerung oder Schwächung; z. B. monto = Berg, monteto = Hügel; ŝiri = reißen, ŝireti = pflücken;
- „eg“ bezeichnet eine Vergrößerung oder Steigerung; z. B. domo = Haus, domego = Palast, dometo = Hütte; varma = warm, varmego = heiss;
- „da“ dient zur Bezeichnung des Genitivs nach Gewicht, Mass u. dgl. bezeichnenden Wörtern (entspricht dem franz. Teilungsartikel); z. B. unu kilogramo da zukro;
- „mal“ bezeichnet den geraden Gegensatz des im Stammwort ausgedrückten Begriffes; z. B. riĉa = reich, malriĉa = arm; bela = schön, malbela = hässlich.
- „re“ (Präfix) = wieder zurück; also revidi = wiedersehen; redoni = zurückgeben; rei = wiederholen.
- „dis“ = zer, auseinander, hinaus; disrompi = zerbrechen; sendi = senden, dissendi = hinaussenden, versenden;
- „ek“ = gibt an, dass die im Stammverb ausgedrückte Tätigkeit im Anfang begriffen oder von momentaner Dauer ist; z. B. ekkrii = aufschreien; soni = tönen, eksoni = ertönen;
- „ne“ = nicht, un; z. B. ebla = möglich, neebla = unmöglich.
- „il“ = Werkzeug; z. B. sonori = läuten, sonorilo = Glocke; tranĉi = schneiden; tranĉilo = Messer;
- „ig“ = veranlassen, zu etwas machen; bezeichnet also, dass das im Stammwort Ausgedrückte zur Ausführung gebracht wird; z. B. pura = rein, purigi = reinigen.
- „iĝ“ hat dazu noch reflexive Bedeutung; also purigi = sich reinigen.
- „ej“ dient zur Bezeichnung des Ortes, wo das im Stammwort Ausgedrückte geschieht oder sich befindet; z. B. preĝi = beten, preĝejo = Kirche; malsanulo = der Kranke, malsanulejo = Krankenhaus.
- „ist“ dient zur Bezeichnung der Person, welche sich mit dem im Stammwort Ausgedrückten beschäftigt; z. B. kuraci = heilen, kuracisto = Arzt; ĝardeno = Garten, ĝardenisto = Gärtner.
- „ad“ bezeichnet, dass die im Stammwort ausgedrückte Tätigkeit eine andauernde ist; z. B. kanti = singen, kantado = Gesang; servi = dienen, servado = Dienst; batali = kämpfen, batalado = Schlacht.
- „sen“ = ohne (los, un); z. B. dependa = abhängig, sendependa = unabhängig, eraro = Fehler, senerara = fehlerlos;
- „el“ = aus; z. B. fosi = graben, elfosi = ausgraben;
- „trans“ = jenseits (über, hinüber); z. B. transpaŝi = überschreiten;
- „tra“ = durch (hindurch); z. B. travidi = hindurchsehen;
- „al“ = zu (an, hin, herbei); z. B. alveni = herbeikommen;

- „en“ — in (hinein, herein, ein); z. B. iri — gehen, eniri — eingehen.*)
 „nj“ — den ersten 2—5 Buchstaben eines weiblichen Eigennamens angefügt, verwandelt diesen in ein Kosewort; z. B. Mari — Manjo (Mariechen).
 „ĉj“ — hat dieselbe Bedeutung bei den männlichen Eigennamen; z. B. Aleksandro — Aleĉjo.

El la „Dua libro“ de Dro. Esperanto.

La venontajn apartajn pecojn estas donataj ke la lernantoj povu ripeti praktike la regulojn de l' gramatiko internacia kaj kompreni bone la signifon kaj la uzon de l' sufiksoj kaj prefiksoj.

1.

Amiko venis (= unu el la amikoj venis). — La amiko venis (= la konata amiko, au la amiko, kiun oni atendis). — Donu al mi libron. — Donu al mi la libron, kiun vi promesis al mi. — Tiu ĉi ĝardeno estas amata loko de birdoj. — La fenestro estas amata loko de la birdoj (= niaj birdoj). — La vorto „la“ estas nomata „artikulo“; ĝi estas uzata tiam, kiam ni parolas pri objektoj konataj. Anstataŭ „la“ oni povas ankaŭ diri „l“, se ĝi ne estos malbonsona. — Se iu ne komprenas bone la uzon de la artikulo, li povas tute ĝin ne uzi, ĉar ĝi estas oportuna, sed ned necesa.

2.

Jen estas la patro. — Mi aŭdas la voĉon de la patro. — Mi ricevis donacon de la patro. — Diru al la patro, ke mi estas sana. — Ni iros al la patro. — Karolo aĉetis por sia kuzino horloĝeton kun tri montrantoj. — Ni vidas per la okuloj. — Rakontu al ni la novaĵojn, kiujn vi aŭdis pri niaj malfeliĉaj fratoj. — De kiu vi ĝin aŭdis? — Mi pensas pri la sorto de mia fratino, kaj mi kalkulas jam la minutojn ĝis nia revido. — Aŭgusto estas bona, Mario estas pli bona ol Aŭgusto, sed Ernestino estas la plej bona el ĉiuj miaj gefratoj. — La malgrandan filinon de mia najbaro mi amas ne malpli ol mian propran infanon; hodiaŭ mi aĉetis por ŝi tre belan ludilon.

3.

Sesdek minutoj faras unu horon, kaj dudek kvar horoj faras unu plentagon. — Mi loĝas en la tria etaĝo. — Hodiaŭ estas la dek kvina (tago) de Aprilo. — La dudeka de Februaro estas la kvindek unua tago de l' jaro. Tiu ĉi rivero havas ducent naŭdek kvar kilometrojn da longo. — Georgo Vaŝingtono estis naksita la dudek duan Februaron (aŭ: je l' dudek dua Februaro) de l' jaro mil sepcent tridek dua. — Sendu al mi prunte dekduon da forketoj. — Tio ĉi okazis antaŭ cent jaroj. — Mi aĉetis du ŝrankojn kaj pagis por ili cent frankojn. — Jen estas cento da pomoj. — En tiu ĉi lando loĝas tri milionoj kristanoj (aŭ: da kristanoj). — Duobla fadeno estas pli forta ol unuobla. — De tiu tago mia amikeco al li duobliĝis. — Kvar fojojn mi jam estis tie. — Duonon de tiu ĉi piro mi manĝis, kvaronon mi donis al mia nevo, kaj la lastan kvaronon mi forĵetis. — Kvinope ili tiris la keston kaj tamen ne povis ĝin altiri al la domo. — Se vi venos al li triope, li redonos, kion li prenis; ĉar unue li timos vian forton, kaj due li ne povas sin pravigi. — Al ĉiu el la laborantoj li donis po kvin dolarojn.

4.

Mi vin ne komprenas sinjoro. — Vi estas tre obstina mia amiko. — Vi ĉiuj estas tro fieraj. — „Vi“ ni diras egale

* In gleicher Weise können auch andere Präpositionen zur Wortbildung verwendet werden.

Zusammengesetzte Wörter entstehen durch einfache Anreihung der Wörter. Das Grundwort kommt zuletzt. Grammatikalische Endungen werden als selbständige Wörter betrachtet; z. B. vaporŝipo (Dampfschiff) besteht aus vapor Dampf, ŝip Schiff und o — Endung des Substantivs.

Alle internationalen Wörter (die sogenannten Fremdwörter) werden in der internationalen Sprache gebraucht; nur nehmen sie in solchem Falle die internationale Orthographie an. Auf diese Weise ist es überflüssig, eine ungeheuren Menge von Wörtern zu lernen.

al uno persono aŭ objekto kaj al multaj; tio ĉi estas farita pro oportuneco, ĉar, parolante kun iu, ni ofte ne scias, kiel diri al li; „vi“ aŭ „ci“ („ci“ signifas la duan personon de l' unu nombro; sed tiu ĉi vorto estas trovata sole en la plena vortaro; en la lingvo mem ĝi preskaŭ neniam estas uzata).

La ĉapisto ne venos, ĉar li estas malsana; se venos lia plej maljuna filo, vi povas ankaŭ ĝin doni al li; sed se venos lia malgranda infano, donu al ĝi nenion. — Jen estas la hundo, donu al ĝi oston, kaj voku la katinon, ĝi ricevos pecon da viando. — Mi amas min, ĉar ĉiu amas sin mem. — Vi estimas vin mem, sed aliaj vin ne estimas; mia frato estimas sin ne multe, sed aliaj lin tre estimas. — Montru al mi vian kalkulon. — Ili kondukis la kolegojn en sian loĝejon, anstataŭ iri kun ili en ĵiljan. — Oni diras, ke vi estas riĉa.

5.

Kial vi ne respondas al mi, kiam mi vin demandas? — La patro skribas leteron, kaj la infanoj preparas siajn lecionojn. — Kion li babilas? Li babiladas la tutan tagon. — Nia gasto kantis la ĉiukonatan romanecon de N. — Mia onklo ekkantis kaj tuj ĉesis, sed mia frato kantadis la tutan vesperon. — Karolino ĉiam obeadis la ordonojn de sia patrino, sed hodiaŭ ŝi ne obeis. — Kiam mi venis al li, li tuj finis sian laboron. — Vi ne malhelpis min, ĉar kiam vi venis, mi estis jam finita mian laboron. — Li batalos, ĉar li ne dormos trankvile, ĝis li estos venkinta la malamikon. — Se mi nur estus sana, mi estus tute kontenta. — Se ili estus dirintaj la veron, ili ne estus nun punataj; nun ili konfesis ĉion, sed ĝi estis jam tro malfrue. — Johano, serĉu mian kraĵonon. Ni iru promeni, sinjoroj! — Li ne esperu pardonon! — Savu min, amikoj! — Mi lernas pentri, kaj ludi gitaron. — Instruante, ni lernas. — La lernanto devas esti instruanto. — Libro instruanta estas tre utila. — Ne ĉiu instruanto estas instruisto. — Dio estas la kreinto kaj la reganto de l' mondo. — Ferminte la pordon, li komencis sin senvestigi. — La venonta gasto estas ankoraŭ en la vojo. — La elpelito malsatas jam la trian tagon. — Punata antaŭ la rompita poto, la kato eble komprenos la kaŭzon de l' punado. — La konstruota domo kostos multon da mono. — Batate de la mastro, li ploris kaj juris, ke li terure vengos. — En tiu ĉi ĉiĝernejto la infanoj estas edukataj tre bone, ĉar la lernejestro sin okupas je sia afero kun amo. — Tio ĉi montras, ke via nepo estas ne bone edukita. — Dum en unu ĉambro la gastoj dancadis, en la dua ĉambro estis preparata la vespermanĝo; kiam la tablo estis preparita, oni invitis la gastojn al la tablo. — Kio estos hodiaŭ prezentata en la teatro? Aŭdu, infanoj! se vi estos prezentitaj al la generalo, salutu lin ĝentile. — La fraŭlino, kiu estis edzinigota de mia frato, mortis, ne fariĝinte ankoraŭ eĉ lia fianĉino. — La formojn kunmetitajn (ekzemple: mi faradas, mi estis farinta . . . kaj (ceterajn) — oni devas uzi sole tiam, kiam la senco ĝin necese postulas.

6.

La adverboj (evortoj), kiuj estas kreitaj el aliaj vortoj, finiĝas je la litero „e“, ĉiuj aliaj adverboj ne havas konstantan finiĝon kaj apartenas al la vortoj simplaj. — Li estas severa juĝanto, li juĝas severe, sed juste. — Nun estas varme, sed l5 nokto kredeble estos tre malvarma. — Li estas tre riĉa, kaj li donis al la malfeliĉulo tro malmulte, ĉar li estas konata avarulo. — Kun tiu papero mi ekiris per grandaj paŝoj al la komercisto; sed antaŭ la magazeno mi renkontis kaleŝon, en kiu sidis riĉe vestita sinjoro. Elirinte el la kaleŝo kaj forĵetinte la pecon da cigaro, kiun li estis teninta inter la fingroj, kaj diris sen la antaŭ parolo: „ne, por vi mia magazeno estas fermita, pro la malbonaj sciigaĵoj, kiujn mi ricevis pri vi de homoj kredindaj. — Mi eltrinkis tutan botelon da vino, kvankam ĝi ne tre plaĉis al mi. ĉar la vino estis bona, sed la botelo estis de brando. — Oni diras, ke vi gajnis la grandan gajnon; se tio ĉi estas vera, mi vin gratulas. — Li diras, ke mi estus pli feliĉa, se mi estus pli diligenta. — La mastro diris, ke mi foriru, ĉar se ne-li min elpelos per la hundoj: — Ho, kiel mi estas laca! Ei! kia malkonvena esprimo! Hura! vivu la reĝo!